Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 21-an de septembro 2023 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo
La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 24-an de aŭgusto 2023
La protokolo de la pasinta kunveno aprobiĝis.

3. Interna kaj alekstera informado

La tuja estonteco de Norvega Esperantisto: Post helpopeto de Douglas pri enpaĝigado de Norvega Esperantisto 2/2023 Claude transprenis tiun taskon. Krome Douglas esprimis deziron transdoni la konstantan redaktan respondecon al aliulo. Li daŭre pretas kontribui al la laboro, interalie per korektlegado. La estraro nomumis Claude redaktoro de la tuj aperontaj numeroj. Ni celas, ke aperu entute kvar numeroj en 2023. Pluraj estraranoj kontribuos per materialoj al numeroj 3 kaj 4 de 2023. Ni decidis uzi pagendan servon de la presejo por dissendi la revuon. Ni sendos la revuon nur al tiuj membroj, kiuj pagis en 2022 kaj 2023 (eventuale ankaŭ en 2021).

Reta novaĵletero: Ni intencas ekde 2024 dissendi al la membroj retajn novaĵleterojn. La celoj estas rapide informi pri novaĵoj kaj montri ke nia organizaĵo vivas kaj agadas. La novaĵleteroj enhavu kaj tekstojn kaj ilustraĵojn kaj aspektu moderne. La tekstoj estu ĝenerale nelongaj, sed ofte havu ligilojn al aliaj fontoj por plua legado. Ni komisias al Judith P. Abrahamsen fari konstantan fasonon de la novaĵletero kaj petos ŝiajn konsilojn pri dissenda sistemo. La unua novaĵletero aperu en januaro.

Telefonnumero de NEL: Ĉar ne plu funkcias la servo de konstanta telefono en Esperantonia ni provizore indikas la numeron de la privata poŝtelefono de Douglas kiel telefonan numeron de NEL.

Havigo de retpoŝtaj adresoj de membroj: Ni plulaboros por havigi retpoŝtajn adresojn.

Eldonado kaj dissendado de Esperanto-Nytt: Ni opinias, ke indas verki norveglingvajn novaĵojn pri Esperanto. Ĉar la celgrupo estas komuna, materialoj en Esperanto-Nytt aperu ankaŭ sur nia retpaĝo. Artikoloj de la du nedissenditaj Esperanto-Nytt, verkitaj de Bård en 2023, publikiĝu sur nia retpaĝo.

4. Reteno de membroj.
Ricevinte de Claude liston de nepagintoj, Bård sendos al ili paperan memorigleteron pri kotizpago.

5. Heredaĵo de Ester Olsen
Ni decidis meti la monon en BN Bank por ricevi pli da interezoj ol en la nuna bankkonto.

6. OD-dagen
Dum Operasjon Dagsverk 2.11.23 ni provu laborigi grupo(j)n de ekz. tri lernejanoj (vgs), kiuj provu trovi kaj prilabori ideojn pri Esperanto-informado inter junuloj. La laboro okazu tie, kie ni havas aktivulojn pretajn organizi ĝin (ekz. Tromsø). Ĉiu junula labortago kostos al NEL 450 kronojn.

7. Eventualaĵoj
Neniu.

8. Venonta estrara interkonsiliĝo:
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos la 19-an de oktobro je 20.30.

Protokolis Marianne Lund